TEJO-aktuale: numero 446, 2018-04

**Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe** Facebook **kaj** Twitter**.**

**446 | Aprilo 2018**

Ĉu vi ne vidas ĝuste la mesaĝon? Rigardu ĝin en via retumilo.

# Iĝu Komitatano B de TEJO

Venis la tempo por kandidatiĝi kiel **Komitatano B de TEJO** por la oficperiodo de la **1-a de junio 2018 ĝis la 31-a de majo 2020**. Komitatanoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo en la supera instanco de TEJO: la **Komitato**.

Detaloj por kandidatiĝi ĉe nia retpaĝaro.

---

# TEJO-trejnadoj pri egaleco dum la IJF en Italio

Dum la **Internacia Junulara Festivalo** en Marina di Ascea, suda Italio, okazis trejnadoj de TEJO kadre de la Erasmus+ projekto **Florigu Egalecon Inter Junuloj** (angle *Fostering Equality in Youth*).

La projekto, financita parte de la Eŭropa Unio, celas plibonigi la kondiĉojn rilate al genra egaleco, alirebleco, kaj aktivisma agenteco por junuloj en Esperantujo.

Por legi pli.

---

# Iĝu la ŝanĝo kiun vi volas vidi en Esperantujo

Partoprenu kaj aktivu en Esperantujo!

Retrovu la mesaĝon de la Ĝenerala Sekretario de TEJO Charlotte Scherping Larsson ĉe la retpaĝaro de TEJO.

---

# Trejnado pri Volontula

# Lingvoinstruado dum la Junulara E-Semajno

Kadre de la **Erasmus+** projekto pri **Volontula Lingvoinstruado**, okazis dum la Junulara E-Semajno en Pollando 3-taga intensa trejnado kiu kovris bazajn temojn.
La trejnadon partoprenis pli ol 15 homoj el 8 engaĝitaj organizoj kaj estis gvidata de du longtempaj kaj spertaj instruistoj, **Jana Kamenická** kaj **Szilva Szabolcs**.

La resto de la rakonto tie.

---

## Venontaj Eventoj

- 20 - 27-an de Aprilo - PRINTEMPaS en la Kastelo Greziljono, **Francio**
- 27 - 29-an de Aprilo - 1-a Kunveno de Sudorientazia Junularo - Ayutthaya, **Tajlando**
- 28-an de Aprilo - 1-a de Majo - Krokodila renkontiĝo en Tuluzo, **Francio**
- 28-an de Aprilo - 1-a de Majo - 5-a Centrejo, Žďár nad Sázavou, **Ĉeĥio**
- 1 - 5-an de Majo - Mirinda Lviv en Lviv, **Ukrainio**
- 14 - 22-an de Julio 2018 - Somera Esperanta Studado en Liptovský Mikuláš, **Slovakio**
- 4 - 11-an de Aŭgusto 2018 - IJK 2018 en Badajoz, **Hispanio**

---

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Gilbert Niyukuri
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Paul Helly, Ariel Palmer

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

*Kopirajto © 2018 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno

N-ro 446